

La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

Nro 2/1981 ★ 5 kr

Koran

Bonvenon al Malmö!



Esperantoförbundet


Adress: EsperantoCentro,
Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm ★
Telefon: 08 - 11 74 34 ★
EsperantoCentro är öppet måndag
— torsdag kl. 17 — 19 ★ **Postgiro:**
20 12-3, Esperantoförbundet ★
Medlemsavgift: direktansluten
medlem 50 kr, ungdomsmedlem
under 26 år 25 kr, familjemedlem
(utan tidning) 15 kr ★
Prenumerationsavgift för *La Espero*
ingår i medlemsavgiften ★
Medlemmar under 30 år får
dessutom ungdomsförbundet SEJUs
blad *ktp.*

La Espero

Organ för Svenska
Esperantoförbundet ★ **Adress:**
EsperantoCentro, Brunnsgatan 21,
11138 Stockholm ★ **Ansvarig
utgivare:** Bertil Åkerberg ★
Redaktör: Franko Luin,
Mygdalsvägen 123, 135 42 Tyresö,
telefon hem 08-712 82 91 ★
Prenumeration: 40 kr per år,
postgiro 20 12-3,
Esperantoförbundet ★ Tidningen
utkommer med åtta nummer per år
★ **Fotosats och tryck:**
EsperantoCentro, Stockholm 1981

Esperantoförlaget

Postadress: Box 7502, 200 42 Malmö
★ **Besöksadress:** Möllevångsgatan
20 B ★ **Öppettider:** 1 sept — 15 maj:
onsdagar kl. 10 — 11, torsdagar kl. 17
— 18 ★ Skriftliga beställningar
expedieras hela året, även under
sommaren ★ **Telefon:** 040-12 20 29
★ **Postgiro:** 578-5 ★ **Expedition:**
Wivi Nilsson ★ **Styrelsens
ordförande:** Åke Blomberg



HODIAŬ

Ĉiu esperanto-libro estas reklamilo pri la kultura valoro de esperanto

Sur iu paĝo de ĉi tiu numero de *La Espero* vi trovos anoncon de Eldona, kun invito aliĝi al nova libroklubo — libroklubo kun libroj en esperanto.

Temas pri maniero igi la esperantistojn legi pli da libroj, per tio ke oni elektas kelkajn taŭgajn librojn po jaro kaj distribuas ilin al la klubmembroj en la plej eble simpla maniero.

La nomo libroklubo eble signifas por multaj klubon kun multaj elektoeblecoj, grandaj rabatoj, racia distribuado kaj centmiloj da membroj. Pri tio ne temas. La esperanta libroklubo de Eldona estas je la nivelo de la esperantistoj, ne promesas pli ol ĝi realisme povas. Ĝin realigas grupo da entuziasmuloj, kiuj opinias, ke la bonaj libroj en esperanto devus troviĝi en kiel eble plej multaj esperantistaj hejmoj.

Estas grave, ke la libroj troviĝu ĉe la esperantistoj. Ĉiu bona libro estas varbilo por esperanto, pravigilo pri la taŭgeco de nia lingvo, ĝia esprimkapablo kaj kultura valoro.

Multaj esperantistoj havas grandajn bibliotekojn, sed tre ofte ili konsistas el libroj eldonitaj antaŭ kelkaj jardekoj; la novaj libroj, pro iu aŭ alia kaŭzo, ne trovis lokon en ili. Kial? Ĉu la interesiĝo pri libroj subite ĉesiĝis? Ĉu la libroj, kiuj nun aperas, ne estas same bonaj?

Tiel ne povas esti. Daŭre aperadas libroj, kiuj laŭ sia kvalito egalas aŭ superas la pli frue aperintajn, same kiel ankaŭ libroj, kiuj laŭ sia stilo kaj enhavo taŭgas por legantoj, kiuj ne postulas "altan arton" de verko, sed facilecon kaj kompreneblecon.

Esperantaj libroj devas troviĝi en esperantistaj bibliotekoj kaj ne en la stokejoj de la eldonistoj. Kaj mirinde multaj libroj rapide elĉerpiĝas. Kelkfoje tiel rapide, ke leganto, kiu atendas recenzon en sia gazeto, tro malfrue rimarkas sian perditan eblecon. Ankaŭ por ili aliĝi al libroklubo estos avantaĝa.

La Espero nur malofte aperigas recenzojn de esperantaj libroj. La kaŭzoj pri tio estas du: la eldonistoj nur malofte sendas librojn por recenzo kaj, se ili sendas, temas pri libroj, kiujn oni ne volonte rekomendas al la legantoj. Kaj publikigi recenzojn de nur malpli bonaj libroj ni ne volas. Due: mankas bonaj recenzistoj, kiuj pretus regule legi novajn librojn kaj iom rapide verki sian recenzon. Aperigi artikolon pri libro, kiu dume jam elĉerpiĝis, neniu gazeto volas.

Por rekompenci la mankon de freŝaj recenzoj, *Espero* ek de la pasinta numero publikigas eseon de Marjorie Boulton pri la esperanta literaturo. Ĝi estu via gvidilo al la "malnova" esperanto-literaturo. Tra la nova literaturo gvidu vin la libroklubo de Eldona.

Ĉiu posedanto de esperantolibro estas reklamanto de esperantolibroj kaj per tio reklamanto de esperanto. Ja, fakte, kiu informiloj pli taŭgas ol ĝuste libroj? Kiuj povas esti same konkreta ekzemplo pri la kultura valoro de esperanto?

Aliĝu al la libroklubo de Eldona!

Franko Luin

INNEHÅLL/ENHAVO

- 22/Hodiaŭ: Esperanto-libroj
- 23/Skall Kina föreslå esperanto i FN?
- 24/Eesperantonytt
- 25/Fyra dagar i Malmö under pingsthelgen
- 26/Brasilienkongressen nu allt närmare
- 28/Disertacio en Lund pri Zamenhof-ideoj
- 29/TEMO: Brazilo
- 29/Kontinente granda lando de kontrasto
- 30/”Kunpuŝigo de tri mondoj”
- 31/Dependas entute de la praarbaro
- 31/Neperforta batalado kontraŭ perforto
- 32/Forigas praarbarojn kaj kreas dezertojn
- 33/Premiita verkisto skribis pri esperanto
- 33/Semoj el tuta mondo por japana ĝardeno
- 34/Marjorie Boulton: Ne nur leteroj de plum-amikoj (2)
- 37/Tabulo
- 38/JES&NE
- 39/Persone: Kiam Lundgren miras, lasu lin paroli
- 40/Danko al la vivo

Skall Kina föreslå esperanto i FN?

Folkrepubliken Kina lär överväga att inom FN föreslå att esperanto antas som FNs sjätte officiella språk.

Denna uppgift cirkulerar i pressen och härstammar från Kinas officiella nyhetsbyrå Hsinhua (Nya Kina).

Artikeln, så som den jugoslaviska tidningen *Vjesnik* publicerat den den 1 februari lyder:

Kineser föreslår esperanto för FN
Kineserna tänker föreslå esperanto som Förenta Nationernas sjätte språk. Som Hsinhua meddelar, påpekade man vid den nyligen hållna möte, vid vilket Pekings Esperantoförening blev bildad, att införandet av esperanto som Förenta Nationernas officiella språk skulle jämställa de stora och små nationerna i världsorganisationen. Över tusen studenter läser esperanto i Peking, man har kurser i detta språk vid 14 kinesiska universitet och ungefär 22 000 kineser läser esperanto vid brevsolor.

Nyheten är av sådan vikt att man ska vara försiktig när man använder den. Man kan först och främst tro, att det rör sig om en tidningsanka — det skulle inte ha varit första gången. Därför ring-

de SEF till stockholmskontoret för Hsinhua och kollade uppgiften. Efter några dagar kom svaret, inte helt entydigt, men dock så pass mycket, att notisen som helhet får hög trovärdighet.

Enligt korrespondenten som SEF talat med, härstammar notisen från Hsinhua och innehållet är korrekt. Det är alltså sant att så många läser esperanto just nu. Även vad gäller den första delen, att Kina överväger att föreslå esperanto, framhöll korrespondenten, att det stämmer nog, men han kunde inte ge detaljer och la till, att han hade ingen uppgift om förslaget redan lagts fram.

Att överväga en åtgärd är inte detsamma som att föreslå det. Men redan uppgiften att regeringen för världens största nation, som redan har sitt eget språk som officiellt språk inom FN, tänker föreslå esperanto, är en sensation, som visar med vilket intresse esperanto följs i Kina idag. Och lägger man till det det enorma intresse i Iran, så ser vi en bild där esperantoverksamheten förflyttas med snabba steg från Europa till tredje världen, en utveckling som vi kan hälsa med stor tillfredsställelse.

Franko Luin

Starkt intresse för esperanto i Iran

Iran har under de senaste åren upplevt inte bara en islamitisk revolution utan också en "esperanto-revolution". Den började 1977 och pågår med oförminskad styrka. Sedan man i en sociologisk lärobok för mellanskolor ägnat några kapitel åt att presentera det internationella språket, har undervisningsministeriet fått ta emot tiotusentals brev från elever och lärare. Man föreslår intensivkurser för lärare och att språket ska tas upp i studieplanerna för mellanskolorna.

Ministeriet sände i april förra året ut ett officiellt cirkulär om att alla lärare i främmande språk kan delta i intensivkurser i esperanto. I de kurser som ägde rum under sommaren 1980 deltog närmare 700 lärare.

Världsturismen och esperanto

Den världsturismkonferens som hölls i Manila på Filippinerna 27 september — 10 oktober förra året antog en deklaration som klart refererar till det internationella språket esperanto och dess roll för att underlätta internationell kommunikation. I konferensen deltog 107 regeringsdelegationer och representanter för 91 internationella organisationer (FN, Unesco m.fl.).

Den aktuella delen av Manila-deklarationen lyder i fri översättning:

"Konferensen rekommenderar att ansträngningar görs för att öka medvetandet om turismen, för att på så sätt underlätta och hjälpa kommunikationerna mellan turisterna, invånarna på de besökta platserna och turistnäringens folk; understryker därvid vikten av kunskaper i språk, särskilt i de som är avsedda för universell användning, såsom esperanto..." (!)

Franskt lagförslag om esperanto

I lagförslag nr 67, som framlades i den franska senaten den 4 november förra året, föreslås att esperanto införs som frivilligt ämne i mellanskolor och i den högre undervisningen.

Motiveringarna är främst att det är nödvändigt med ett gemensamt språk i den moderna världen, att de nationella språken bör vara likaberättigade och att det ligger ekonomiska och kulturella faror i hegemoni för ett nationellt språk.

Esperanto som kulturmedium

Att esperantister kan lära sig mycket om främmande kulturer genom sitt unika språk är välkänt. I Jugoslavien har esperantisterna gått ett steg längre och låter också allmänheten få glädje av esperantos möjligheter. I Zagreb och fr.o.m. 1980 också på andre platser i landet anordnar man regelbundet återkommande kulturdagar, då inbjudna representanter för mindre kända kulturområden informerar om sin kultur.

I december förra året var det Maltas tur att presentera olika sidor av sin gamla kultur, alltifrån historia och musik till litteratur och filmkonst. Föredragen tolkades från esperanto till kroatiska. Såväl allmänhet som TV och radio visade stort intresse för arrangemanget. Radion sände t.ex. nästan fyra timmars program om maltesisk kultur i översättning från esperanto.

Ekologi och pedagogik

blir de ämnen som kommer att behandlas under sommarens universitetskurser på esperanto vid universitetet i Liège i Belgien 5 — 19 juli.

Smått och gott

Bulgarien. I Varna vid Svarta havs-kusten kommer det att bli inte mindre än 18 tvåveckorskurser i esperanto mellan den 1 april och den 29 december i år. Tre lektionstimmar varje dag och därefter bad (under den kalla årstiden i inomhusbassänger), utflykter och kvällsprogram med kulturinslag och underhållning.

Frankrike. Det kooperativa institutet för modern skola (Freinet-pedagogiken) ordnar kurser i Vaison-la-Romaine i Sydfrankrike 16 — 26 juli. Syftet är att lära ut och ge praktik i esperanto enligt naturmetoden.

I Sète vid franska medelhavskusten blir det internationellt esperantomöte 15 — 20 september.

Japan. Sex universitet hade under oktober—november förra året utställningar om esperanto.

Jugoslavien. Den 3 till 12 juli blir det esperantoskola i Kotor Vardž.

Kina. Under 1980 ägnade 22 kinesiska TV- och radiostationer program åt det internationella språket.

Polen. Den polska radion sände den 16 januari i år sitt 20 000:e (!) program på esperanto.


Ungern. Ungern kommer i år att vara värdland för tio olika internationella esperantoarrangemang, bl.a. konferenser för järnvägsmän, skolungdomar och naturvänner, ett s.k. sommaruniversitet, en sommarskola och ett vinterläger.

Österrike. Österrikiska esperantoförbundet ordnar mellan den 3 och 10 maj en internationell ferievecka i St. Urban vid Ossiacher-sjön i Kärnten. Föredrag, diskussioner, intensivkurs och konversationskurs står på programmet. ■

Fyra dagar i Malmö under pingsthelgen

Nu har dagarna för årets svenska esperantokongress kommit ännu närmare. Om du fortfarande tvekar mellan att komma med eller inte, ska du absolut läsa denna artikel.

Årets kongress, som fått beteckningen "jubileumskongress", kommer att pågå i fyra dagar. Du behöver dock inte vara med alla dagarna. För din orientering följer här nedan en sammanfattning av de olika aktiviteterna under dessa fyra dagar.



Kompanihuset i Malmö tillhör sevärdheterna

FREDAG 5 JUNI

Denna dag är vikt för Kristliga Esperantoförbundet. Det har sitt årsmöte, gemensam lunch och andra programpunkter enligt särskild dagordning mellan kl. 10 och 18, mesta tiden i Malmöklubbens lokaler (Kronetorpsgatan 94, Segevång). Samling vid Centralstationen kl. 9.15.

Alla andra kan på egen hand bekanta sig med Malmö, ta en tur över till Köpenhamn, besöka Malmöklubbens lokal, efter kl. 18, där klubben bjuder på kaffe. En rätt så fri dag, om man inte tänker vara med på KEF-årsmötet.

LÖRDAG 6 JUNI

Från kl. 8.30 kan man besöka Sjömansgården och ordna sina mellanhavanden med kongressen, köpa esperantoböcker, posta sina brevkort och brev (de kommer att få en minnesstämpel) eller besöka Bångs salong, där en särskild utställning visas.

Institutet sammanträder under en timme från kl. 10, SEFs styrelse och järnvägsmännen (var för sig) från kl. 11.

Kl. 10 kan man åka till Malmöklubbens lokal och få lite kaffe,

medan man tittar på den.

SEJU kommer att ha sitt årsmöte kl. 12, medan alla andra lunchar.

Kl. 13.30 kommer klubbrepresentanter, och alla andra, att ha möjlighet att diskutera med SEFs styrelse: om administration, avgifter, böcker.

Kongressens viktigare del börjar kl. 16. Då samlas alla i Bagersalen (vid Caroli City) för jubileumsfestligheter. Det kommer att finnas flera talare, som kommer att beröra de två jubilerande organisationernas historia: SEFs och Malmöklubbens.

Dessutom kommer Ebbe Vilborg att tala om "Esperanto eller engelska".

Kl. 19 kommer alla som vill ha möjlighet till en gemensam supé på Sjömansgården. Efteråt blir det underhållning av olika slag: musik, sång, trolleri.

SÖNDAG 7 JUNI

På söndagen äger de flesta årsmötena rum. Kl. 9 är det dags för Esperantoförbundet, som får klara alla sina frågor på en timme.

Kl. 10 är det dags för SEFs årsmöte och då förväntas de flesta vara med och bidra till diskussionerna, inte så mycket om den gångna verksamheten som om den kommande.

Det blir gemensam lunch och lunchpaus fram till kl. 14, när Claude Piron från Schweiz ställer upp och talar om "Problem i internationell språklig kommunikation".

Kl. 15.45 får vi igen möjlighet att lyssna till Piron och diskutera med honom, då om ämnet "Argument för esperanto".

Kl. 17 blir det för andra gången möjlighet att diskutera med SEFs styrelse om aktuella frågor: informationsmaterial, tryckeriet och liknande.

Kl. 19 är det dags för tesupé med efterföljande program på scen.

MÅNDAG 8 JUNI

Dagen börjar med gudtjänst kl. 7.30 i Sjömansgårdens kapell.

8.30 avgår bussarna för en rundtur genom Malmö, bl a till det område där Esperantogatan kommer att ligga.

Kl. 11 är det så dags för en sista lunch, varmed kongressen avslutas.

Som du ser, ger kongressen tillfälle till diskussioner vid otaliga tillfällen, men lämnar gott om tid för enkel samvaro med bekanta. Man startar mjukt på fredagen och avslutar mjukt på måndagen.

I förra numret av *La Espero* har du fått ett inbetalningskort som används för anmälan. Om du behöver veta något mera, skriv gärna och fråga. Adressen är Esperantokongressen, c/o Torsten Lund, Falkmansgatan 7 B, 217 62 Malmö.

Sänd din anmälan i tid, senast den 15 maj.

Brasilienkongressen nu allt närmare

Årets internationella esperantokongress, den 66e i ordningen, äger rum i Brasiliens huvudstad Brasilia. Det är den första kongressen i Sydamerika och en av de få utanför Europa. Deltagarantalet kommer inte att uppgå till Stockholmskongressens nivå (1800 anmälda), men det rapporteras redan ca 1000 anmälda i februari 1981, därav nästan hälften från värdlandet Brasilien. Kongressens program bjuder på alla traditionella bitar: sammanträden för Komitato, diskussioner, arbetsgrupper, underhållningsprogram (musikafton, brasiliansk afton, internationell afton, teater), arbetsmöten för en rad olika organisationer, kurser och så också invigning, bankett, bal osv.

Dessutom finns det möjlighet att delta i ett omfattande utflyktsprogram: rundturer i Brasilia med ark. Oscar Niemeyers arkitektoniska skapelser, till vattenfallet Itiquira, till staden Cristalina med dess juvelerariindustri. Eller att delta på de längre utfärderna efter kongressen: till varma källor i Caldas Novas, en veckas utflykt på floden Araguaia, ett tredagarsbesök i Brasiliens gamla huvudstad (1549 — 1763) Salvador, till Manaus, en gång gummiråvarans huvudstad.

Nästan 40 svenskar är anmälda till kongressen i Brasilia och antalet kan stiga lite till. De blir

tydligt inte avskräckta av de höga flygpriserna, utan ser detta som en unik chans att bekanta sig med ett så avlögset resmål.


FLERA FLYG-ALTERNATIV

Esperantoförbundet anordnar inte någon egen resa till Brasilien, utan hänvisar sina medlemmar till de arrangemang som UEA anordnar. Det finns möjlighet att välja mellan en sex-sju olika varianter, från den

billigaste, som bara omfattar flygresan till Brasilien (Brasilia eller Rio de Janeiro) till en rundflygresa genom hela Sydamerika med Lufthansa (Brasilien, Bolivia, Peru, Ecuador, Kolumbien).

2600 gulden kostar det allra billigaste alternativet (ungefär det dubbla i kronor); för rundresan med Lufthansa får du betala ca 11 000 kronor från Köpenhamn, plus tillägg för vistelsen i Brasilia, för enkelrum och kanske lite till. Men det kan säkert vara värt pengarna.

Reseprogrammen för de andra alternativen är på ungefär två veckor och omfattar besök på andra orter förutom Brasilia. Så kan man t ex flyga med Varig till Recife, Salvador, Brasilia och Rio för 4410 gld från Stockholm; eller



BRASILIEN-AVGIFTER

1. Icke medlem i UEA	444 kr
2. Medlem med årsbok	399 kr
3. Medlem med årsbok och "Esperanto"	332 kr
4. Make/maka till (1)	310 kr
5. Make/maka till (2) eller (3)	280 kr
6. Ungdom t o m 20 år	134 kr
7. Heltidsstuderande t o m 30 år	222 kr
8. Synskadad	179 kr

Anmälningsblanketter får du från Asta Schaedel, V. Ronneholmsvägen 42 B, 217 41 Malmö, telefon 040-91 63 09. Du betalar till postgiro 147429-5, Esperantoförbundet, Specialkonto. Anmälningsblanketten skickar du till ovanstående adress.

med KLM till Sao Paulo, Rio och Brasilia; eller, också med KLM till Rio, Sao Paulo, Igacu och Brasilia. De som vill vara med på TEJO-kongressen, som äger rum i Mexico, kan också flyga med KLM.

Priserna för alla dessa arrangemang ligger på ca 9 000 — 10 000 kronor, med olika tillägg. Alla som har anmält sig, eller tänker anmäla sig, får detaljerad information med *Dua bulteno*, som finns färdig.

Men det räcker inte att flyga till Brasilia. Man ska ha anmält sig också. I rutan här intill ser du hur du gör det.

Esperantoförlaget

Förlagsföreningen Esperanto upa / Eldona Societo Esperanto

Välkommen till ett spännande äventyr: en bokklubb med böcker på esperanto! Vi kallar bokklubben för NOVA LIBRO.

Varje år kommer det ut en mängd böcker på esperanto. Ur bokfloden kommer 3 – 5 nya böcker att väljas och erbjudas dig. Det blir framför allt lättlästa böcker, med spännande innehåll.

Inget krångel. Du får den utvalda boken hem till dig. Med varje bok följer ett inbetalningskort. Vill du behålla boken betalar du inom 10 dagar. I annat fall skickar du tillbaka den inom 10 dagar i samma påse, så att vi ser att den kommer från dig. Om du vill kan du sälja boken till någon annan.

Rimlig kostnad under ett år. Böckernas pris varierar: en bok kan kosta 30 kronor, en annan 70, en tredje mer.

I bokklubben betalar du ett lägre pris än vid enstaka beställning. Din kostnad per år kommer (i 1981 års priser) att vara omkring 250 kronor.

Enkelt att bli medlem i NOVA LIBRO. Du behöver bara skriva ett kort, där du säger att du vill vara med, och *undertecknar det*. (Vill du inte vara med längre, räcker det också med ett kort.)

Du adresserar kortet till Esperantoförlaget, Bokklubben NOVA LIBRO, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm.

Första valet en deckare. Din första bok blir Johán Valanos tredje deckare, "Ĉu li venis trakosme?". För den får du betala 65 kronor. Då är porto och moms inräknade.

Välkommen till ett spännande äventyr!

**NOVA
LIBRO** 

Disertacio en Lund pri Zamenhof-ideoj

Ĉe la universitato de Lund Hans Henrikson pretigis doktorigan disertacion pri Zamenhof. Ĝi prezentigos iam dum la printempo. Sen personregistro ĝi estas preskaŭ 260-paĝa manuskripto. En esperanto ĝi ricevis la titolon *Esperantisma pontoreligio — Studo pri religiaj trajtoj en la frua epoko* (svede: 'Doktor Esperantos broreligion — En studie av religiösa drag i den tidiga esperantismen'; Acta Universitatis Lundensis; Studies in Comparative Religion). Al la disertacio estas aldonita resumo en esperanto kaj en la angla.

La tempo, kiun Hans Henrikson priesploras estas la tempo antaŭ la unua mondmilito, do la tempo kiam Zamenhof ankoraŭ vivis. Pro la gravega rolo, kiun li ludis dum tiu frua periodo de la esperantomovado, la studo centriĝas ĉirkaŭ la rolo de Zamenhof. La sveda titolo tion pli klare indikas ol la esperanta.

La esprimo *religio* estas en la studo uzata en tre vasta senco, same kiel Zamenhof uzis ĝin; kaj li uzis ĝin, ĉar mankis al li pli ekzakta vorto.

Same kiel Zamenhof konstruis esperanton, kiu funkcio kiel pontolingvo en mondo, kie okazis bataloj kaj diskriminacio pro lingvaj kaŭzoj, li ankaŭ laboris pri la *pontoreligio*, kiu ebligu al la homaro pacan kunekzistadon malgraŭ la religiaj malsimilecoj, ankaŭ oftaj kaŭzoj je bataloj kaj diskriminacioj. Tiu *pontoreligio* esprimiĝis ĉe Zamenhof diversmaniere: per simplaj ideoj pri paco, komprenejo, frateco; kaj per pli ellaboritaj sistemoj, al kiuj li dediĉis sin dum la malfruaj jaroj de sia vivo: hilelismo, homarantismo.

Ĉu eblas diferenci inter la esperantisto Zamenhof kaj la pontoreligiano Zamenhof? demandas sin Hans Henrikson, kaj serĉas en la havebla arkivmaterialo respondon al tio. Kian influon la "religiaj" ideoj de Zamenhof havis al la frua esperantomovado? Kiajn sekvojn?

Legante la studon oni surprizigas pri la riĉeco de fontoj pri Zamenhof. Hans Henrikson "fosis" en la arkivoj de la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, la Universitata Biblioteko de la Hebrea Universitato en Jerusalemo, en la privata biblioteko de Paul Neergaard, sed ankaŭ en la biblioteko de la loka klubo en Lund. Grandan helpon li krom tio ricevis en la materialo jam kolektita kaj publikigita pri Zamenhof: la diversaj kolektoj de liaj leteroj, lia verkaro, artikoloj en *Nica Literatura Revuo* (ĉefe temantaj pri lia juda agado, sed gravaj por ĉi tiu studo), kaj la kolektaĵoj de A. Holzhaus.

La studo facile legiĝas; el ĝi kristaliĝas la simpatia personeco de Zamenhof (oni rimarkas, ke la aŭtoro simpatie rilatas al li), la granda idealisto, al kiu lingvo kiel solvo de lingvaj problemoj ne signifis solvon de ĉiuj problemoj. Li provis en pli vasta kadro helpi al la homaro.

Ne multo restas en la esperantomovado de la "religiaj" ideoj de Zamenhof. La ĝenerala idealismo povas esti unu trajto de ili, la *interna ideo* eble alia esprimo de la samo. El la studo ankaŭ elstaras la klopodoj de Zamenhof ĉiam esti "unu el multaj" kaj ne gvidanto.

Sed ĉi tiu artikolo ne celas resumi la tutan studon, ankaŭ ĝi ne pretendas esti kritika analizo de ĝi. Por tion fari, necesus multe pli profunda studo. Sed ĝi povas rapide prezenti la konkludojn, al kiuj Hans Henrikson venis, nur resume.

Laŭ li la frua esperantismo estis riĉa je religiaj elementoj, kiuj ludis gravan rolon en la disvolvado de la lingvo kaj la movado. Multaj el tiuj religiaj elementoj devenas de Zamenhof mem. Ankaŭ tiuj religiaj elementoj enhavis iaspecan "neŭtralecon" de ideoj. Ian specialan "religion" tamen eĉ la frua esperantismo ne enhavis, nur ĝeneralajn ideojn pri "korkompreno", iu volo plibonigi la mondon per komuna lingvo.

Serĉante paralelojn kun aliaj tiatempaj movadoj la aŭtoro, tute nesurprize, trovas ilin ĉe la pacifismo, kaj ne ĉe iu religia movado.

Kiel jam dirite: facile legebla studo, kiu, sen pretendi esti biografio pri Zamenhof, tamen alportas kelkajn novajn karakterizojn pri la aŭtoro de esperanto. Ĉu tiu karakterizo estas ĝusta aŭ prava — tio estas la tasko de la opoziciantoj de la disertacio.

Alia demando, kiu levigas, estas pri la haveblo de la studo. Nur du ekzempleroj de ĝi ekzistas, laŭ tio, kion mi aŭdis, sed se ekzistas intereso pri ĝi, oni devus produkti pliajn. Eble sendu karteton al SEF kaj informu pri via interesiĝo, tiel ke oni priesploru la eblecon je pli grandkvanta kopiado, eble presado, de la studo.

Franko Luin

DEKALER



En på din bil kanske.

En annan på en dörr. Och så en på din resväska.

Plastdekaler, vita med grönt tryck. 13 cm i diameter. 10 kronor för tre. Finns hos

EsperantoCentro.

Beställning per postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

Kontinente granda lando de kontrastoj

Brazilo estas kontinento. Dudekoble tiom granda kiom Svedio, kun 120 milionoj da loĝantoj, ĝi estas lando kun grandegaj kontrastoj. Oni ne bezonas kompari la urbegojn Sao Paulo kaj Rio de Janeiro kun la novaj urbetoj en la praarbaro por rimarki tiun kontraston. Ĝi estas videbla en ĉiu unuopa urbo, de la plej malgranda ĝis la plej granda. Sao Paulo kaj Rio de Janeiro, kie estas koncentritaj la riĉeco kaj bonfarto de la lando, multe similas al teknike evoluintaj landoj en Usono kaj Eŭropo: altegaj domoj, larĝaj avenuoj, abundega trafiko — kun sekvaj problemoj pri malpurigo de la aero kaj akvoj.

La nova ĉefurbo Brazilio, kun sia avantgarda arkitekturo kaj urboplanado, ankaŭ montras klare la kontrastojn de tuta Brazilo. Ekster la planiteco de urbo de la registaro kaj registaraj

oficistoj, de la diplomatoj, de la hoteloj, troviĝas la neplanita urbo de la malriĉuloj, de la laboristoj, de ĉiuj, kiujn allogis tien la espero pri pli bona vivo.

Brazilo estas ankaŭ lando de kontrastoj politikaj. Depost 1964 ĝi estas estrata de militistara registaro, kiu atingis la povon post puĉo. Dum la jaroj variis la grado de demokratia libereco en la lando. Ĝuste nun ŝajnas, ke blovas iaspeca "demokratiiga vento" en Brazilo. Joao Figueiredo, prezidento elektita en 1979, ĉesigis la antaŭajn malpermesojn kaj permesis plurpartian sistemon. Liberaj elektoj okazos en 1982. Se ...

Oni devas diri "se", ĉar jam pli frue okazis, ke ... ili ne okazis.


NE NUR KAFO

Ni konas Brazilon ĉefe kiel eksportanton de kafo. Sed ĝi estas ankaŭ produktanto kaj



La sekvantaj kvar paĝoj temas, ĉefe, pri Brazilo. Ne pri la kongreslanda turisma vizago, en si mem interese, sed pri kelkaj hazarde elektitaj eroj el mozaiko, kiu donus detalan bildon de Brazilo.

Sao Paulo altiras pli kaj pli da loĝantoj. Eble ĝi baldaŭ atingos 8 milionojn da ili.



TEMO BRAZILLO

eksportanto de tuta aro da aliaj produktoj. Brazilo estas, fakte, unu el la plej riĉaj landoj de la mondo — aŭ ni prefere diru: ĝi povus esti. Granda parto de ĝiaj riĉaĵoj estas en la mano de eksterlandaj multnaciaj aŭ usonaj entreprenoj (ankaŭ svedaj), aŭ en la manoj de malgranda grupo da brazilaj riĉulaj familioj.

Brazilo havas amasojn da ferro, fakte ĝi estas plej riĉa en la mondo je ĝi; ĝi estas la dua plej granda produktanto de terkulturaĵoj (kafo, sukerkano, sojo, greno)

Alia riĉaĵo de Brazilo estas ĝia praarbaro (pri kiu temas la sekvaj artikoloj en ĉi tiuj TEMO-paĝoj). La tutan praarbaron trairas pli kaj pli vasta reto de vojoj, laŭ kiuj sekvas miloj da homoj, kiuj serĉas viveblecojn en novkulturado. La vojojn sekvas ankaŭ ekspluatado de la riĉaĵoj. Temas pri la ligno, en si mem tre valora, sed ankaŭ pri ercoj: oro, magnezio, urano, boksito, tantalito.

La brazila industrio estas kelkrilate tre bone evoluinta. La aŭtoindustrio estas unu el la ĉefaj industribranĉoj de la lando, sed la fabrikoj estas usonaj aŭ eŭropaj, aŭ japanaj. La salajroj estas, laŭ svedaj normoj, malaltaj, sed havo de laborloko estas multe pli grava ol la alteco de la salajroj.

Kio estas la plej granda malamikado de la salajruloj, estas la inflacio. Ĝi atingis pasintjare la nivelon de 110 procentoj. La salajroj estas indekse altigataj ĉiun duonjaron, sed ili neniam reatingas sian antaŭan nivelon. La malaltigo de la aĉetpovo ankaŭ kaŭzas oftajn strikojn, almenaŭ nun post la ioma demokratiigo. Okazis antaŭ nelonge, ke sindikataj gvidantoj estis enkarcerigitaj pro vastaj strikoj.

”Kunpuŝiĝo de tri mondoj”

La libro Tra lando de indianoj de Tibor Sekelj aperis en esperanto en 1970 kaj priskribas la kelkajn jarojn pli fruan ekspedicion al la brazila regiono Matogroso. La libro plenas je anekdotoj, priskriboj, etaj rakontoj en la pli granda rakonto. Jen unu el ili, tute mallonga, kiun la aŭtoro titolis ”Kunpuŝiĝo de tri mondoj”.

Je noktiĝo de la oka tago de navigado tra Aragvajo ni ekvidis la palpebrumantajn lumojn de loĝloko. Estis la urbeto Leopoldina, bone signita en miaj mapoj. La sekvintan tagon ni enveturis ĝian havenon. Tie mem, el la profundaj akvoj, frunte de Leopoldina, elmerĝiĝas, kvazaŭ fantomoj de pasinta epoko, la skeletoj de du ŝipoj, kun primitivaj kaldronoj el fero. Jen la restaĵoj de la ŝipoj de generalo Couto de Magalhaes, pioniro de la navigado tra la rivero Aragvajo en la lastaj jarcentoj de la pasinta jarcento, epoko kiam tia ideo estis nura sonĝo. Tiu viziulo venis ĝis Leopoldina kaj fondis tie vilaĝon, kies loĝantoj estis krimuloj ekzilitaj kaj devigitaj resti en tiu loko.



Hodiaŭ baraktas en tiu malgranda spaco tri mondoj: la restaĵoj de fieraj indiĝena raso antaŭkolumba, en formo de malgranda rezervejo por la karaĵaj indianoj; la bildo de la loĝloko, en kiu la ekskrimuloj ricevis ŝirmejon, en formo de larĝa senviva strato; kaj fine, la dudeka jarcento kiu alvenadas heziteme, reprezentita de ŝoseoj, de radiostacio kaj de motorboatoj, tuŝantaj de tempo al tempo la havenon de Leopoldina.

Salutinte la membrojn de la ekspedicio, sin preparanta por ekmarŝo kaj komercanta per sensaciaj novaĵoj pri Fawcett kaj aliaj esploristoj, ni enpaŝis la urbon. Ĝi konsistas el ĉefstrato kaj el du aŭ tri krucstratoj, kun domoj teretaĝaj, vicigitaj per plata monotonio. En la strato regas absoluta trankvilo, interrompata apenaŭ de kelkaj pasantoj. Kaj, malgraŭ tio, Leopoldina havas aspekton urban, ne vilaĝan.

Dezirante sendi leteron al Buenos Aires aerpoŝte, mi demandis pri la poŝtoŝtelo, kaj oni indikis al mi domon, kiu portis montrosignon *Poŝta Stafeto*. Mi frapis al la fermita pordo, sed neniu respondis. Fine, post insistita frapado, aperis maljuna sinjorino, pli malpli sepdekjara, la reprezentantino de la stafeto. Mi klarigis al ŝi mian deziron sendi leteron, al kio ŝi respondis:

— Jes, de ĉi tie vi povas sendi leteron. Certe!, jam sendis pluraj. Preskaŭ ĉiumonate venas ŝarĝaŭto de la poŝto de Goiana, alportante leterojn, se venas tiaj. Sed jam de du monatoj ne venas la poŝtaŭto kaj nun, kiam komenciĝas la pluvsezono, ĝi ne povos plu veni; la vojoj estas tiel malbonaj ...

Aŭdante tion, mi sentis min transportita al la epoko de la bona sinjoro Couto de Magalhaes, kiam la tempo ankoraŭ ne estis la kvara dimensio, aŭ se ĝi jam estis, plenumis tiun funkcion sekrete, ĉar neniu tion sciis.

Tibor Sekelj

Dependas entute de la praarbaro

La brazila praarbaro estas maldense loĝata. De la originaj enloĝantoj restas nur iaj 100 000, loĝantaj en malgrandaj vilaĝoj po 60 personoj. El tiuj, kiuj ne dependiĝis de la okcidenta civilizo (ekzemple la misiistaj stacioj), plejparto estas entute dependa de la praarbaro kaj ĝiaj produktoj. Ilia vivnivelo estas, laŭ niaj mezuroj, ŝtonepoka.

Sed ĉar tute dependaj de la naturo, ili nekutime bone konas ĝin kaj ĝiajn eblecojn. Ili scias, kiu arbo estas taŭga por kiu tasko kaj kie trovi ĝin; kiu planto estas uzebla kiel medicinaĵo, kiu kiel manĝaĵo.

Je la tempo de la eŭropa okupo de Sudameriko, la indianoj estis oble pli multaj, sed eŭropanaj malsanoj kaj mortiga-


ankaŭ alion, kio ne estas nepre vivnecesa. El akvolilio, ekzemple, ili ricevas, post forbrulo kaj purigo, iaspecan salon, per kiu ili spicigas sian manĝaĵaron. Pasi-floro donas al ili trinkaĵon, kiun ili uzas kontraŭ gravediĝo.

La indianaj vilaĝoj estas, kiel dirite, malgrandaj, kun mezume 60 loĝantoj. Ili loĝas en kelkaj grandaj domoj, kovritaj per palmfolioj, tri aŭ kvar familioj po domo. Ĉiu familio povas posedi



proprajn kuirilojn aŭ aliajn helpilojn, sed ĉion alian ili posedas komune. La teron ili komune kulturadas, ili kune ĉasas (la viroj) kaj komune uzas la kulturaĵojn kaj ĉasaĵojn.

Neperforta batalado kontraŭ perforto



doj de tutaj triboj dekonigis ilian nombron. La moderna tekniko, kiu penetras per larĝaj vojoj, modernaj maŝinoj kaj grandskala ekspluatado de la praarbaro, estas alia minaco al ilia pluekzistado.

La indianoj, kiuj sukcesis rezisti la invadon de la "blankuloj" aŭ ankoraŭ ne influigis de la okcidenta civilizo, estas por ĉiuj siaj bezonoj dependaj de la praarbaro. Ili kulturadas ĉefe maniokon, maizon, kotonon kaj tabakon. Por kulturi ilin, ili senarbigas pecon de la praarbaro, uzas ĝin dum kelkaj jaroj kaj poste forlasas ĝin por nova loko. La sojlo estas fakte ne tre riĉa kaj rapide foruziĝas.

Sed el la praarbaro ili ricevas

La suba artikolo ne temas nur pri Brazilo, sed pri tuta Latinameriko — do ankaŭ pri Brazilo. Ĝi estas verkita kiel recenzo de antaŭ nelonge aperinta libro en la sveda.

Dum memorinda ekumena diservo la 12an de decembro en la preĝejo Gustav Vasa en Stokholmo la kunvenintoj spontane kaj varmege honoris la argentinan Nobelpacpremiiton Adolfo Perez Esquivel.

Jam kelkajn jarojn pli frue oni priatentis la latinamerikan neperfortan bataladon, kiam norvegoj donis al la brazila ĉefepiskopo Camara la "popolpremion". Adolfo Perez Esquivel nun donis al sia amiko kaj instruisto H.

Camara la duonon de sia premio.

Gustatempem antaŭ la nobelfesto aperis la sveda traduko de la libro "La donaco de la malriĉuloj al la riĉuloj". Plej multaj kontribuantoj estas verkitaj de latinamerikanoj. Unu el la aŭtoroj, Hildegard Goss-Mayr estas laborinta plurajn fojojn en Brazilo, komisiita de la Internacia Repaciga Federacio.

Servo por paco kaj justeco

Neperforta movado ekzistas depost 1966, kiam post iniciato de la Repaciga Federacio katolikoj kaj protestantoj el pluraj latinamerikaj ŝtatoj kunvenis en Urugvajo, kie ili pritraktis la temon "Perforto kaj neperforto kiel vojo al liberigo".

Dum kontinenta konferenco en Kolombio oni fondis kunlaboran organizon, kies longa nomo en esperanto estas "Servo por paco kaj justeco por ebligi liberigajn agojn en Latinameriko per neperfortaj metodoj". Kiel kunordiganton la organizo elektis la argentinan skulptiston kaj docenton Adolfo Perez Esquivel, kiu ekde tiu konferenco laboris por paco plentempe. Li ricevis la taskon havi kontaktojn kun neperfortaj batalantoj en diversaj partoj de Latinameriko kaj

subteni ilin.

Inspiron por sia laboro li ricevis parte el la vivo de Mahatma Gandhi kaj el la hinda himno Bhagavad-Gita, parte el la Nova testamento. Li opinias, ke la instrumento de subpremado estas formita por detruo la homojn spirite, fizike kaj psike.

Pro tio estas bezonataj fortoj, kiuj "liberigas la spiriton, eĉ se la korpo estas mallibera". Por li tio ne estas vanaj paroloj. Pro politikaj kaŭzoj li estis karcerigita dum pli ol unu jaro en argentinaj malliberejoj, sen esploro, akuzo aŭ juĝado. Dum tuta semajno li estis enŝlosita en ferotubo sen ebleco moviĝi.

Komunecaj grupoj

Ĉu vi miras pri la titolo de la libro "La donaco de la malriĉuloj al la riĉuloj"? Post multjara sperto Hildegard Goss-Mayr konvinkigis, ke la malriĉuloj havas mesaĝon pri liberiĝo al la riĉuloj de la nuna tempo: neperforto. Iliaj pacaj klopodoj estas forto, kiu ŝanĝas la homon kaj la mondon.

Ŝiaj opinioj igas min paroli pri la ekleziaj komunecogrupoj, kiuj evoluigis inter terlaboristoj, bienetuloj, industrilaboristoj kaj aliaj malriĉuloj en la kamparo kaj en la urboj. La homoj kunlaboras, ili, ekzemple, konstruas domojn, plugas kampojn, prizorgas malsanulojn kaj provas ekscii la kaŭzojn de la regionaj problemoj.

Pluraj pastroj, monaĥinoj kaj aliaj profesiuloj kaj la malriĉuloj kunlaboras kaj provas alternativajn anstataŭ perforto kaj maljusteco.

Kampanjo por homaj rajtoj

"Servo por paco kaj justeco" stimulas la respekton de la homaj rajtoj. Esquivel unflanke provis konigi la celojn de la Unuiĝintaj

Nacioj laŭ la Universala deklaro de la homaj rajtoj, aliflanke pruvis, ke latinamerikaj reĝimoj faras krimojn kontraŭ paragrafoj de la deklaro. En kelkaj latinamerikaj landoj estas fonditaj centroj por defendi homajn rajtojn. Tie tiuj, kiuj ekhavis problemojn, povas paroli kun konsilanto, ekzemple advokato, psikologo, pastro, instruisto, sociologo, kiu provas analizi la problemojn kaj klarigi la juran situacion. Tiamaniere la homoj klopodas pli bone kaj neperforte solvi siajn malfacilaĵojn, realigi intertraktadojn, mem eldiri siajn opiniojn en sindikatoj aŭ ekleziaj grupoj aŭ rifuzi akcepton de maljustaj postuloj.

Liberiganta morala premo

La libro, kiu pritraktas limigitan parton de la latinamerika situacio, donas imponajn ekzemplojn pri neperfortaj agadoj. Oni opinias, ke "liberiganta morala premo" (dirmaniero de Dom Helmer Camara) estas pli efika ilo ol perforto, ĉar en plej bona kazo ĝi povas malarmigi la kontraŭulon. Tamen ankaŭ neperforta luktado estas riska. Pluraj personoj mortis per la

manoj de murdistoj.

La karakteriza trajto de neperforto estas lumigita en la materialo el konferenco en 1977, kiam la latinamerikaj episkopoj pritraktis la temon "La evangelia neperforto — povego por liberiĝo". Perforto facile formas spiralon, kiu kaŭzas novan perforton. Estas eble, ke neperforto evoluigas novan procedon, kiu plibonigas la homajn rilatojn. La pacemuloj tial malakceptas la uzon de perforto por ŝanĝi la ekzistantajn cirkonstancojn kaj daŭrigi netolereblan kaj maljustan situacion.

La celo estas, ke oni havu moralan forton super la subpremanto, tiel ke li konscias pri la maljusta konduto kaj laŭ sia propran instigo forigas la maljustaĵojn.

Adolfo Perez Esquivel kaj aliaj varmaj kaj grandanimaj personoj estas tre ekkonindaj al ni. Mi rekomendas al la svedoj la libron "La donaco de la malriĉuloj al riĉuloj".*

Dagmar Lindman

"De fattigas gáva till de rika" de Hildegard Goss-Mayr k.a., Falköping 1980

Forigas praarbarojn kaj kreas dezertojn

Ĉie en la mondo, kie praarbaroj kovras vastajn areojn, eŭropaj, nordamerikaj kaj japanaj ekspluatantoj grandskale malarbigas la arbarojn. Ankaŭ en la amazona praarbaro, kaj kun la sama rezulto. Tute senkonsidere al la ekologia balanco de la praarbaro, riĉa je miloj kaj dekmiloj da malsamaj plantoj, oni per modernaj tre efikaj maŝinoj elradikigas la ekonomie valorajn arbojn kaj forportas ilin. Restas malŝirmita sojlo, kiun la abundaj kaj fortaj pluvoj rapide forlavas al la plej proksima rojo, rivero, maro. Post la maŝinoj restas nefertila dezerto.

Kontraŭe al la kredo, ke tero, kiu povas produkti tiel riĉajn arbarojn, devas esti tre fertila, la praarbara tero enhavas malmulte da organikaj substancoj kaj tre rapide elĉerpiĝas. La indianoj,

kiuj utiligis la praarbarojn por terkulturado dum jarmiloj, nur dum du-tri jaroj povas uzi la samajn kampojn — poste ili formoviĝas. Samajn spertojn faras la kamparanoj, logitaj al la amazona praarbaro de ŝtataj kampanjoj. Post du jaroj ilia penado donas magran rikolton, post tri aŭ kvar jaroj ili malsatus. Nur tre abunda kemia helpo povus riĉigi la sojlon, je kosto, kiun malriĉaj kamparanoj ne kapablas elspezi.

Iom pli sukcesaj estis la klopodoj reuzi la antaŭan praarbaron por paŝtado, ekzemple en Mato Grosso, kie oni semis herbon sur la cindron de la praarbaraj plantoj. La tre vastaj areoj montriĝis taŭgaj por paŝtado de bovoj. Sed la tero sub la herbo ne kapablas kreskigi ion alian ol nur herbon.

Premiita verkisto skribis pri esperanto

Dum la granda librodissvendado en februaro ĉijara unu el la libroj estis de la nobelpremiita verkisto Isaac Bashevis Singer. De li eble nenio ekzistas en esperanto, bedaŭrinde. Sed la verkisto en la disvendata libro, aŭtobiografia, rakontas pri sia rilato al esperanto. La verko nomiĝas *Junulo serĉas amon* (Ung man söker kärleken) kaj la rilataj linioj tekstas jene:

"Mi trovis tion, kion mi serĉis — ĉambron ĉe maljuna paro sur Dzikastrato, kiu de la Varsovia urba konsilantaro parte ricevis la nomon Zamenhofstrato laŭ la kreinto de lingvo esperanto. La posedanto de la apartamento, doktoro Alpert, okulkuracisto, estis fakte estinta bona amiko de la mortinta doktoro Zamenhof, kiu loĝis kaj laboris kiel okulkuracisto du domojn pli for. Mi estis studinta esperanton en Bilgoraj. Mi eĉ estis provinta skribi skizon en tiu internacia lingvo kaj opiniis, ke estas honoro rajti loĝi ĉe kolego de ĝia kreinto. Malgraŭ miaj pekoj..."

La aŭtoro daŭrigas rakonti pri la trovita ĉambro. Kelkajn paĝojn pli poste li revenas al dro Zamenhof. Tio okazas dum diskutado kun juna graveda virino, kiun li pretas edzinigi por helpi al ŝi atingi sian fianĉon en Palestino. Dum diskuto ŝi de-

mandas:

"Ĉu ĉiuj homoj devas aparteni al unu grupo kaj tiri post si ĉiujn tiujn pezojn de miskredoj kaj



diskriminacioj? Kial ne povas troviĝi unuigita homaro kun nur unu lingvo?

— Doktoro Zamenhof provis tion ankaŭ. Mi fakte loĝas sur la strato, kiu estas nomita post li kaj kiu estis antaŭe parto de Dzikastrato. Sed la homoj ne volas aparteni al unuigita homaro."

Ion plian mi ne trovis, almenaŭ ne en tiu libro. Sed la informo, ke li en sia junaĝo lernis esperanton kaj tion daŭre memoras, signifas, ke tio ne estis nur hazarda afero por li. Estus interese, se iu el la usonaj esperantistoj povus pli detale pristudi tion. Verkistoj kun rilato al esperanto ne malabundas. Sed verkistoj, kiuj ricevis la nobelpremion kaj iam lernis aŭ aliel rilatis al esperanto, vere ne estas ĉiutagaĵo.

Se vi ankoraŭ ne legis la libron, pruntu ĝin en via biblioteko. Vi trovos ankaŭ aliajn interesaĵojn en ĝi.

Semoj el tuta mondo por japana ĝardeno

Atingis *La Esperon* letero diketa kaj donanta iom mistikan sonon. Montriĝis post kontrolo, ke tiu sono venas de semoj aldonitaj al la letero. La letero kaj la semoj venis el Japanio kaj alportis ian historieton. Jen ĝi:

En Yamaguĉi ekzistas universitato, en kies medicina kolegio ekzistas ĝardeno. Tiu ĝardeno

estas nomata "Florbedo de l'espero" kaj la floroj kreskigataj tie devenas de semoj senditaj tien de esperantistoj.


Sed ne ĉiuj plantoj dissemiĝas de si mem kaj multiĝas. Okazis, ke el la komencaj dekoj da diversaj plantoj nun restas nur du. Ĉar la ĝardeno portas tiun nomon, kaj ĉar sur la ŝtono ĝin ornamanta oni povas legi:

*Ni semas kaj semas,
neniam laciĝas
pri l'tempoj estontaj
pensante*

taŭgas resemi la ĝardenajn bedojn per semoj sendotaj de esperantistoj. Ĉu vi emas kontribui al tiu "verda" ĝardeno? Jen la adreso, al kiu vi sendu viajn semojn:

Hatanori Yamaguĉi Universitato
Medicina fakultato
UBE, Yamaguĉi-ken
Japanio.

Sur la bildo videblas *Amarantus Caudatus*, unu el la plantoj, kiuj abunde dissemiĝis. Ĝi originas el Svislando, 1964.



Ne nur leteroj de plum-amikoj (2)

KELKAJ INDIKOJ DE POSTPUBEREKO


Kelkaj iom periferiaj detaloj iom surprizos la novan studenton per sia atestado pri la matureco de la esperanta literaturo, pri la jama malnaiviĝo; kelkaj fenomenoj, kiuj ne povus ekzisti, se ne ekzistus ampleksa kaj varia literaturo, multaj inteligentaj kaj elektemaj legantoj, multaj diversaj verkistoj kaj kelkaj evoluintaj kriterioj.

La nivelo de recenzado, ekzemple, multe altiĝis dum la lastaj jardekoj. Ne nur aperadas en pluraj esperantaj gazetoj recenzoj laŭ metodoj de vera beletristiko, aŭ recenzoj vere erudiciaj pri fakaj studaĵoj, sed recenzoj pri elstaraj esperantaj verkoj komencas aperi sporade en nacilingvaj gazetoj.

La esperantistaro dum multaj jaroj subtenis literaturajn gazetojn, inter kiuj estis la bonegaj *Literatura Mondo*, *Nica Literatura Revuo*, *Belarto*, *Monda Kulturo* kaj *Norda Prismo*; sed la subteno ofte ne estis sufiĉe grandskala. Nuntempe ni havas *Fonto* kaj *Literatura Foiro*; sed multaj mondaj kaj naciaj esperanto-gazetoj enhavas almenaŭ iajn literaturajn erojn valorajn, kaj la bonega ĝenerala gazeto *Monato* iom uzas literaturaĵojn — kaj eĉ pagas la verkistojn!

Universala Esperanto-Asocio jam dum jardekoj aranĝadis en la kadro de ĉiu jara Universala Kongreso bone reklamitajn Belartajn Konkursojn. Io tia komenciĝis jam en 1909, sub la nomo de *Floraj ludoj*, en la kvina Universala Kongreso en Barcelono. Multaj konataj esperantaj verkistoj debutis antaŭ la esperantistaro per verkoj premiitaj en tiaj konkursoj. La branĉoj iom varias de jaro al jaro, sed kutime ili inkluzivas almenaŭ originalan poezion, originalan teatraĵon, originalan prozon. Dum multaj jaroj tradukitaj verkoj estis gravaj, sed nuntempe la tradukarto malpligraviĝas, parte pro la mal-

facilaj problemoj pri juĝado, kiam povus temi pri iu ajn lingvo en la mondo. Povas esti konkursoj ankaŭ pri aliaj branĉoj de literaturo aŭ por neliteraturaj artoj, ekzemple fotografio. Apartan premion oni aljuĝas ĉiujare por "nova talento". Sufiĉaj novaj talentoj daŭre aperadas. La konkursoj devas esti verkoj ankoraŭ nepresitaj. La juĝantaro konsistas el mondkonataj esperantistoj kun speciala kompetenteco pri beletristiko. La kriterioj estas severaj. Oni preferas ne



aljuĝi la unuan aŭ eĉ la duan premion ol permesi malaltigon de la nivelo. Kutime konkursas ĉiujare inter kvardek kaj kvindek verkistoj.

Alia komitato ĉiujare elektas esperantan "aŭtoron de la jaro". Tiu persono estas tiu, kies kontribuado al la esperanta literaturo dum la jaro estas juĝita la plej valora. Kutime tia kontribuado devas esti ne nur altkvalita, sed iom grandkvanta.

Ekzistas kelkaj aliaj literaturaj konkursoj por esperantaj verkistoj. Naciaj kaj internaciaj kongresoj, eĉ lokaj kunvenoj, plej ofte enhavas ian literaturan parton. Ĝia skalo varias de plena, luksa prezentado de traduko el mondliteratura verko, ekzemple Ŝekspiro, Sartre, Goldoni, Ibsen sur la scenejo de urba teatro kaj per profesia

trupo, ĝis skeĉo iom improvizita kaj kelkaj deklamitaj poemoj. Multiĝas aranĝoj por esperantis- toj — someraj kursoj, semajnfina- naj renkontiĝoj, vesperaj kursoj kaj tiel plu, en kiuj studado de esperantaj literaturaj verkoj estas parto de la pedagogia programo. Mi mem memoras, ekzemple, seminariojn en kiuj miaj kursanoj detale komparis specimenojn de la du esperantaj tradukoj de *Hamleto* (Zamenhof, Newell) kaj de *Songó de someromeza nokto* (Briggs, Kalocsay).

Kvankam la plej elementaj ekzamenoj pri esperanto, en diversaj landoj, esploras nur la ordinaran lingvoscion de la kandidato, jam ekzistas diversaj pli altnivelaj ekzamenoj, inter ili la Internacia Diplomo sub la aŭspicioj de UEA, kaj pluraj kursoj en universitatoj. Por tiuj pli altgradaj ekzamenoj la kandidato devas montri scion pri la historio de la esperanta literaturo kaj pri la plej gravaj verkistoj kaj libroj.

Jam en 1933 aperis unua *Enciklopedio de Esperanto*; ne ia ĝenerala enciklopedio en esperanto, sed enciklopedio pri esperanto, esperantistoj kaj esperantaj aferoj: duvoluma, 600-paĝa, kun 300 aldonaj bildpaĝoj. Tie troviĝas artikoloj pri *Antologioj*, pri kvin apartaj gravaj esperantaj *Bibliotekoj*, pri la esperanta *Gazetaro* (33 kolumnoj detaloplenaj); *Humoro*, *Kritiko en Esperanto*, *Libroj*, *Literaturo*, *Neologismoj*, *Rimo*, *Ritmo*, *Stilo*, *Teatro*, *Sonfilmoj*. Mi faris ian krudan kalkuleton pri kiom da verkistoj kaj apartaj verkoj tiutempe ricevis artikoletojn. Homoj povus, kompreneble, havi diversajn opiniojn pri kriterioj; sed se mi ellasas lernolibrojn, vortarojn, librojn nur pri esperanto aŭ esperantologio, terminarojn, esperantajn propagandaĵojn kaj simile, enlasante nur verkistojn kaj verkojn literaturajn almenaŭ larĝsence, mi kalkulas 291 verkistojn kaj 396 diversspecajn verkojn. Ne tre alta estas la procento de verkistoj kaj verkoj artisme daŭre gravaj. Same kiel ĉe naciaj literaturoj oni devas havi grandan arbaron por ke kelkaj orpomaj arboj kresku.

Tiu *Enciklopedio* de 1933, siatempe tre erudicia kaj tre konscienca laboraĵo, estas nun mankoplena pro nura malnoveco; kaj novgeneracia esperantis-

to erudicia, Reinhard Hauptenthal, nun redaktas duan pli grandan *Enciklopedion de Esperanto*, al kiu multaj kolegoj jam kontribuas.

Iom indikas maturecon de pluraj esperantaj literaturaĵoj la fakto, ke oni tradukis ilin en naciajn lingvojn. Populara klarigo pri radio, de Eugène Aisberg, tradukiĝis poste en dudek unu lingvojn, inter ili la ĉinan; juvela verko pri *La vivo de la plantoj*, de Paul Neergaard, aperis en ok lingvoj; oni tradukis en diversajn eŭropajn kaj ekstereŭropajn lingvojn kvar romanojn kaj plurajn novelojn de Julio Baghy; du de Jean Forge; unu de Miyamoto, ekzemple. Ĝis 1974 aperis 133 verkoj tradukitaj el esperanto. Oni ankaŭ uzis esperanton kiel pontlingvon por tradukoj. Ĝis 1969 aperis pli ol cent verkoj, kiujn oni tradukis en unu lingvon pere de esperanta traduko el la originala lingvo. Pluraj el tiuj verkoj estas efemeraj politikaj propagandaj, sed multaj estas vere valoraj artverkoj. Inter ili, nur ekzemple, troviĝas *Eŭgeno Onegin* de Puŝkin, el la rusa en la ĉinan; *Marta* de E. Orzaszkowa, el la pola en la japanan (ankaŭ filmigita!) kaj la ĉinan, pere de la majstra traduko de Zamenhof mem; *Sinjoro Tadeo*, jam menciita, el la pola en la vjetnaman; *Johano la Brava* de Petöfi en la ĉinan, pere de fama traduko de Kalocsay; poemoj de Marie Under el la estona en la japanan

... Kvankam tiaj kulturaj atingoj estas imponaj, eble du el la plej interesaj kaj decidaj pruvoj pri la vera postpubereco de la esperanta literaturo estas du verkoj poramuzaj. Aperis en 1970 ampleksa antologio de plejparte malĉastaj anekdotoj, *Kruko kaj Baniko el Bervalo*, de Louis Beaucaire. La anekdotoj mem estas pli bonstilaj ol bonmoraj, sed por nia nuna temo la signifoplena detalo estas, ke por titolo multajn el siaj anekdotoj la aŭtoro prunteprenas titolojn de konataj esperantaj artverkoj originalaj kaj tradukaj, kaj kelkajn citaĵojn el tre konataj esperantaj poemoj. La plimulto el aliaj titoloj estas konataj esperantaj proverboj. La apliko de librotitoloj al temoj, por kiuj la estimataj verkistoj nepre ne destinis ilin, ofte efikas tre sprite kaj donas al malnovaj ŝercoj unikan spicon.

Tiaj profanaĵoj ne povus okazi sen literatura kulturo konata inter multaj legantoj.

Eĉ pli signifa estas brila libreto siaspeca, kiu aperis en 1962: *Specimene*, de Henri Baupierre (kaŝnomo). Tie Baupierre parodias tridek naŭ konatajn esperantajn verkistojn. (Troviĝas du aliaj eroj.) Kelkajn el la verkistoj mi mem ne sufiĉe konas por juĝi parodiojn. Sed certe pri la plimulto la imitado de metodoj, stilo, verkista temperamento, vortprovizo kaj, ekzemple, versformoj, estas brila. Baupierre videble kapablas je tre detalaj stilaj studoj kaj havas fajnajn orelon por nuancoj. Ke liaj parodioj pri miaj propraj poemoj estas plene justaj kaj terure riproĉaj, estas afero inter li kaj mi; eble feliĉe estas ankaŭ granda tera distanco inter li kaj



mi. Sed ke povas entute ekzisti volumo de brile amuzaj kaj ege trafaj parodioj, estas kredeble absoluta pruvo, ke jam evoluadis en esperanto ne nur ĝeneralaj kriterioj pri stilo, sed analizeblaj individuaj artismaj stiloj.

ESPERANTA POEZIO: MIRAKLA RIKOLTO

Tria signifoplena indiko pri la amplekso kaj arta nivelo de la esperanta literaturo estas *Esperanta Antologio: Poemoj 1887—1957*, redaktita de William Auld, aperinta en 1958.

Ĝi konsistas el 539 paĝoj de poeziaj tekstoj, plus enkonduko, glosoj, notoj kaj biografiaj notoj. Ĝi prezentas zorge elektitajn specimenojn el la verkoj de naŭdek poetoj el Aŭstrio, Belgio,

Brazilo, Britio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Ĉinio, Danlando, Estonio, Francio, Germanio, Hispanio (inkl. Katalunio), Hungario, Islando, Italio, Japanio, Jugoslavio, Latvio, Meksikio, Nederlando, Novzelando, Panamo, Pollando, Rumanio, Ruslando, Sarlando, Sudafriko, Svedio, Svisio kaj Usono. Eĉ kiam ni deprenas du aŭtornomojn, kiuj estas kaŝnomoj por aliaj poetoj en specialaj aspektoj de siaj personecoj, kaj la landon Panamon, kiu eble rilatas pli al la signifo de la greka sufikso ol al geografia situo, restas multaj poetoj el multaj landoj. Post multa elektado Auld reduktis sian *Antologion* al 349 poemoj.

Auld celis artan antologion de la plej bonaj esperantaj poemoj. Konsultolibro devas menci i eĉ la ne sufiĉe lertajn artistojn. *Esperanto en Perspektivo*, 1974, menciis 185 poetojn esperantajn, kaj al la supra listo de landoj ni devas aldoni Argentinon kaj Israelon. La sama verko mencias almenaŭ 136 apartajn volumojn de originalaj poemoj, sed kompreneble multaj poemoj aperis nur en gazetoj.

Ni memoru denove, ke esperanto enmondigis nur en 1887. Statistikado eksterordinara tamen diras malmulton pri poezio: la grava demando estas ne, ĉu poetoj aŭ libroj estas multnombraj, kvazaŭ temus pri produktado de radringoj, sed ĉu la poemoj estas arte valoraj.


Persona konfeso eble plivigliĝos nian temon. Estis la kvalito de la esperanta poemaro, kiu vere igis min mem esperantisto.

Miaj anglaj verkoj temas plejparte pri la angla literaturo kaj pri ĝi estis plejparte miaj fakaj studoj kaj instruistaj laboroj. Mi ankaŭ iom esploris kelkajn aliajn literaturojn. Eklerninte esperanton en 1949, grandparte pro pacamaj motivoj, mi rapide konsentis, ke la lingvo estas facila, logika, utila. Mi komencis legi: hazarde, senkonsile mi elektis unue tre malfortan tradukon de angla majstroverko, kiur mi ege amas; poste etan poemaron ne sen infaneca ĉarmo, sed sen vera poezia valoro. Mi ricevis impreson, ke esperanto estas utila por celoj kiel turismo kaj kolektado, sed ne estas adekvata por la kulturaj celoj, kiuj en mia vivo plej gravas. Kaj se lingvo ne estas adekvata por poezio, ĝi ne

estas adekvata por io ajn, kio temas pri niaj pli komplikaj pensoj, emocioj, psikaj aktivoj.

Tamen, kiam pianoludado malplaĉas al la orelo, ne ĉiam estas, ĉar la fortepiano bezonas agordon. Foje estas la pianludanto, kiu bezonas agordon kaj majstro povas per la sama instrumento krei ravan muzikon.

Ĝuste kiam mi estis preta iĝi nura, kvankam danko, interŝanĝanto de bildkartoj kaj probable eterna komencanto, saĝa instruisto en daŭriga korespondakurso pruntis al mi *Streĉita kordo* de Kalocsay. Tiutempe mi ne perfekte komprenis la libron. La vortprovizo estis por mi iom tro granda, multajn subtilaĵojn mi kredeble ne perceptis. Sed mi tuj vidis, ke ĉi tie mi havas poemojn, kiujn oni povus tute sen absurdeco kompari kun konataj bonaj



poemoj en mia nacia lingvo: kiuj havas enhavojn signifoplenajn, elpensitajn kaj pensigajn; diversajn formojn perfekte regitajn; verajn vortmuzikojn diversspecajn; riĉajn tropojn, emociajn nuancojn kaj kolorojn, strukturojn logikajn kaj emociajn; poemojn, kiuj sendube rajtas esti partoj de la mondliteraturo. Estis esence pro tiuj poemoj de Kalocsay, ke mi restis esperantisto kaj faris kelkajn seriozajn laborojn por esperanto.

Pli ol dudek jarojn pli poste mi vidis, kiel io tre simila okazis ĉe amikino mia, doktorino Kathleen Hall, lektorino pri la franca literaturo. Ŝi lernis la elementojn de esperanto, ŝatis ĝian logikon, trovis ĝin bona ludilo kaj iom utila. Poste ŝi ĉeestis prelegon pri Kalocsay, eklegis liajn verkojn kaj tiel ege entuziasmiĝis, ke ŝi

faris multajn bonegajn tradukojn de poemoj de Kalocsay en la anglan. Mi ankaŭ ne povas plu kalkuli, kiom ofte mi modifis favore la sintenon de iu klerulo pri esperanto, montrante aŭ laŭtlegante ian poemon de Kalocsay. Al angla klerulo traduko de angla poemo ofte estas tute konvinka atestaĵo pri la literatura valoro de esperanto. Se Kalocsay estus la sola esperanta poeto, ne povus post li resti ia ajn racia dubo, ĉu la lingvo taŭgas plene por ĉiuj poeziaj taskoj: epopeo, satiro, liriko, didaktika versa eseo, epigramo, meditaĵo, elegio, poezia dramo, psikologia monologo, kabareda kanzono ktp.

Sed la sola li ja ne estas. Mi jam menciis, ke oni registris 185 poetojn. Nu, kompreneble multaj el ili havis pli da bona intenco ol da talento. Multaj verkis verŝajne por propagandaj aŭ pedagogiaj celoj. Eĉ Julio Baghy, vere granda esperanta verkisto, iam rapidege verkis sian etan poemaron *La vagabondo kantas*, kiu, kvankam ĝi enhavas plurajn perlojn kaj la humuran poemon eble plej deklamitan en esperantaj rondoj, enhavas ankaŭ versajn ŝercetojn, komplimentojn kaj aliajn bagatelojn, kies celo estas pedagogia: prezenti simplajn versaĵojn por komencantoj. Baghy, homo rimarkinde malegoisma, ofte preparolis sian opinion, eĉ principon, ke verkistoj esperantistaj devas foje verki, sinofere, ion pli simplan ol ili deziras kiel artistoj verki, por provizi al komencantoj legmaterialon simplan, sed tamen lingve senriproĉan.

Eĉ kiam ni deprenas fuŝaĵojn, malfortajn versaĵojn, eĉ verkojn laŭdindajn kiel legmaterialon, sed sensignifajn kiel artverkojn, restas vera esperanta rikolto poezia kiu, en la historia, sociologia kaj ekonomia situacio ŝajnas mirakla.

La leganto ne profitos multe per sufoka, anakonde longa nomaro aŭ titolaro nur. Scivolema leganto esploru la grandan antologion kaj la konsultolibrojn. Sed kelkaj elektitaj detaloj donos ian elementan koncepton pri la perspektivoj de la esperanta poezio.

Ĝi komenciĝas kune kun la lingvo mem, per la poemoj de Zamenhof en la *Unua libro*; Zamenhof poste verkis sep aliajn

poemojn. Du estas malgravaj porokazaj verkoj, el kiuj unu, *Al la fratoj*, estas rimarkinde malpli lerta ol la aliaj. Nuntempe la poeziaj metodoj de Zamenhof ŝajnas primitivaj kaj naivaj: li foje rimas nur per gramatikaj finaĵoj, liaj metaforoj estas iom banalaj. Tamen jam li pruvis, ke oni povas verki en esperanto ne nur versajn organizitajn strofojn, sed poemojn almenaŭ dignajn kaj memorindajn; eĉ ke oni povas foje envortigi aŭtentikan lirikiŝmon. Li verkis kelkajn poemojn ankaŭ en la jida. (Pri la jidaj poemoj de Zamenhof esploris A. Holzhaus. Kelkaj informoj aperis en la kvina kajero de la "iam kompletigota plena verkaro" de Zamenhof, *Hebreo en la geto*, Kioto 1976). Li certe havis ian poezian talenton, kvankam vivo de turmenta trookupiteco, kaj



korpo ofte malsana, malhelpis la evoluadon de tiu talento. La du lirikoj de la *Unua libro* restas kortuŝaj. *La espero* restas oficiala himno por esperantaj kongresoj kaj similaj kunvenoj; alia edifa poemo, *La vojo*, restas kara kaj konata; *Preĝo sub la verda standardo* esprimas, simple kaj sincere, kaj vere kun ia efika simpla klimaksemo kaj emociiga ripetado, idealon de religia toleremo kaj interfratiĝo de la tuta homaro. Lasta poemo de Zamenhof, *Pluvo*, estas historie kaj psikologie interesa, sed ankaŭ poezie iom signifa: liriko pri freŝiĝo de spirito dum pluva tago, eble kun nuanco de pensiga ambigueco aŭ simbolismo; poemo de Zamenhof mem, sen edifa aŭ pormovada celo, artverketo sendependa kaj — siamaniere kaj simple — sukcesa.

(daŭrigota)

TABULO

KALLELSE

Andelsägarna i Förlagsföreningen Esperanto upa kallas härmed till ordinarie årsstämma i Malmö, sjömansgården, den 7 juni 1981 kl 09.00. Ärenden enligt stadgarna, \$14. Verksamhetsberättelse kommer att finnas vid stämman. Den kan även rekvireras från Esperantoförlaget, Box 7502, 200 42 Malmö.


Imre Viola interesigas pri lingvoj kaj bieretikedoj. Do li nun celas kunigi la du interesojn. Se vi havas saman intereson skribu al lia adreso: Imre Viola, 2400 Dunaujvaros, Tancsics 13. II/2, Hungario.

Om du beställer poststämplar från Esperantokongressen i Malmö, ska det **nya portot** finnas på kuverten. Den 1 juni går nämligen portot upp igen.

BOKPAKET

Intressanta äldre och nyare böcker med varierande innehåll säljes till kraftigt reducerat pris.

Sätt in 25 kr, 2 paket 50 kr, på postgirokonto nr 578-5, Esperantoförlaget, Så skickar vi omgående.



Västeråsklubben har tryckt C65-kuvert med text på 19 språk lite huller om buller på baksidan. Beställ kuvert för eget bruk. Du får 20 st. för 8 kr ((9,50 inkl. porto, före avgången av maj). Beställning per postgiro 88 43 12-0, Västerås Esperantoklubb.

40-jara franca fervojisto petas poŝtmarkojn kaj bildkartojn de vi. Li recipokos. Michel Ruff, 87 rue du Grand Véon, F-10000 Troyes, Francio.



NUR POR KOLEKTANTOJ!

Postkongrese venis eta kvanto da broduritaj kongresaj emblemoj. Nur cent estas ankoraŭ haveblaj por kolektantoj de kongresaj memoraĵoj. Emblemo en la koloroj de la kongresa glumarko. 25 kronoj po emblemo, havebla nur rekte ĉe la redaktoro de la Espero. Pagu al poŝtgira konto 71 06 88-3, je nomo Franko Luin.

Förlagsföreningen Esperanto upa redovisar för 1980 en nettoförlust av 78 kr, dvs ett nollresultat.

Detta resultat har emellertid kommit fram efter så kraftiga nedskrivningar av varulager, fordringar och anläggningstillgångar som lagen medger, vilket betyder att vinsten före dessa nedskrivningar är avsevärt högre.

Förlaget torde för närvarande kunna anses vara mycket väl konsoliderat.

Omsättningen uppgick till rekordhöga 125 188 kr, varav 69 913 faller på Kongresa Libro-servo, dvs försäljningen vid världskongressen i Stockholm.

Försäljningen vid kongressen, för vilken förlaget efter överenskommelse med UEA helt svarade, gav ett magert nettore-sultat, 3158 kr, varav 50% tillfaller kongressen. Orsaken torde vara den höga mervärdesskatten i Sverige, som gjort det omöjligt att ta ut tillräckligt höga priser för böckerna.

Vid bedömning av resultatet måste dock beaktas, att förlaget indirekt har gjort en betydligt större vinst på kongressen i Stockholm än det officiella resultatet visar.

Dels lyckades vi i Stockholm bli av med en del böcker i vårt varulager, som vi på grund av svårigheten att avyttra dem i Sverige tidigare skrivit ned till 0, dels ledde kongressen till en markant ökning i försäljningen av läroböcker, en del av dem också starkt nedskrivna i våra tidigare bokslut.

De tekniska problemen med sättningen av den nya svensk-esperantiska ordboken har visat sig betydligt större än vi från början räknat med. I samband med nyinköp av en skrivenhet till fotosättningsanläggningen i Stockholm kunde den gamla enheten transporterats till Oskar Svantesson i Göteborg, som välvilligt ställt upp för att sätta ordboken. Den primära sättningen befinner sig nu i slutskedet, men en hel del korrigeringar — också komplicerat och arbetskrävande — återstår att göra.

Förlagets försäljning har intensifierats främst genom att aktivis-

ter i Stockholm hjälpt till med att få ut böcker. Detta har emellertid medfört stora problem och ökad arbetsbelastning för administrationen i Malmö.

Eftersom vi givetvis önskar öka försäljningen är försäljningsverksamheten i Stockholm ett administrativt problem, som våra kunder förmodligen inte förstår, men som måste lösas i en omedelbar framtid.

Ake Blomberg

Partimotioner blir antagna

Det brukar jäsa till bland de politiskt aktiva esperantisterna när det är dags att skriva motioner till sina partiers eller organisationers kongresser. I år är det dags för socialdemokraterna.

I Värmland (?) har Ulf Andersson motionerat till SSU-distriktets kongress att esperanto bör bli c-språk i gymnasieskolan (i enlighet med SEJUs brev till SÖ) och fått sin motion antagen av distriktkongressen.

Från Uppsala får vi veta, att Uppsala arbetarekommun antagit som sin egen en motion av Yngve Nilson från Knivsta. Yngve föreslår i sin motion att "partikongressen uttalar sitt stöd för de strävanden som göres i Sverige och i andra länder, för att esperanto i ökad omfattning skall läras och användas i det internationella arbetet."

Styrelsens (för Uppsala arbetarekommun) yttrande är också värt att citeras:

"Styrelsen tror i likhet med motionären, att ett ökat utbyte av erfarenheter och idéer över nationsgränserna inom bl.a. kulturområdet förutsätter att språksvårigheterna mellan olika folk kan undanröjas. Styrelsen tror också, att vår och den internationella arbetarrörelsens strävan till en ökad solidaritet mellan folken och önskemålen om en fredligare värld skulle få bättre förutsättningar att vinna gehör hos människorna och ledarna i alla länder, om vi kunde språkligt

närma oss varandra."

Finns det fler som lyckats att få sina motioner antagna? Inte bara till partikongresser, utan också till andra organisationer. Hör gärna av er!

Svedoj & finnoj komune aŭtune

Por mezo de oktobro estas planita komuna sved-finna aranĝo surmara, kiu daŭros po du tagoj por ambaŭ grupoj.

En la vendredvespero la svedoj ekiras el Stokholmo al Turku, sekvas komuna sabato en Turku kun riĉa programo, sabatvespere ambaŭ grupoj veturas komune al Stokholmo, kie ankaŭ okazos programo kaj la finna grupo reveturas hejmen en la vespero. La tagoj estos 16, 17 kaj 18 de oktobro. Pli da detaloj sekvos, sed jam nun kontrolu vian almanakon, ĉu vi estas libera dum tiu semajnfino.

Alvoko al medicinistoj

La sciigo de la forpaso de la sveda delegito de UMEA, Janet Enghardt, forlasis nin en granda perdsento.

Kiel delegito por Svedio ŝi donis al ni forton kaj ĝojon eklabori en medicinaj randoj por esperanto. Ni estas tre dankemaj al ŝi.

Nun ni subskribintoj volas proponi kunvenon dum la SEF-kongreso en Malmö pentekoste por diskuti la venontan laboron.

Bonvenon ĉiaspecaj oficistoj en la medicinaj kaj terapiaj fakoj! Ĝis la kongreso je via dispono:

D-ro Melita Dörr
Arlavägen 11
703 63 Örebro
tel. 019-18 98 53

Fleg. Ingrid Ottosson
Ångermannagatan 158
162 22 Vällingby
tel. 08-37 01 84

Ĉu nova SEF-strukturo?

En Norrköping, ĉe SMHI, la instituto, kiu preparas niajn veterprognozojn, ekzistas tia kvanto da esperantistoj, ke oni diskutas fondon de speciala sekcio por meteologoj, ankaŭ ĉar eĉ ekster tiu instituto estas troveblaj meteologoj-esperantistoj.

Dum la jarkongreso de SEF en Malmö okazos eble fonda de sveda UMEA-sekcio, do sekcio de tiuj, kiuj laboras en medicina fako.

En SEF oni trovas tiom da programistoj, teknikistoj kaj ekonomoj, kiuj ĉiutage laboras per komputoroj, ke baldaŭ iu devos iniciati fondon de speciala sekcio por komputoristoj.

Ĉu ni survojas al nova strukturo de nia organizo, kie pli kaj pli da sekcioj fondiĝos por informado pri esperanto en siaj fakaj grupoj? Se jes, tiu restrukturiĝo vere ne venas tro frue!

En Tallinn mortis Hilda Dresen

Unu el la plej konataj poetinoj kaj tradukistinoj esperantaj, Hilda Dresen, mortis en februaro. Pri ŝi skribis la estona gazeto "Kodumaa" (Hejmlando) la jenan (artikolo tradukita de Regina Emson):

"Hilda Dresen, la animo de la estona esperanto-movado kaj unu el la plej maljunaj tradukantoj, mortis la 5-an de februaro 1981 en Tallinn. La estona poezio atingis internacian nivelon pere de esperanto, danke al ŝia vivlaboro.

Hilda Dresen naskiĝis la 11an de majo 1896 en Kolga komunumo, kiel filino de arbarestro, kaj laboris dum pli ol 30 jaroj en la ĉeftelegrafejo de Tallinn kiel telegrafistino kaj radiotelegrafistino. Kiel 17-jarulino ŝi ellernis esperanton je instigo de sia pli aĝa fratino Helmi.

Ek de la jaro 1922 ŝi komencis aperigi en internaciaj esperanteldonaĵoj poemtradukojn de la poetoj M. Heiberg, M. Under, A. Haava, J. Liiv kaj aliaj. Aparte

aperis la traduklibroj "La elektitaj versaĵoj" de M. Under (1929), "Horizontoj" de J. Barbarus (1931). En la kompilado de la esperantlingva "Estona antologio" (1932) ambaŭ fratinoj Dresen faris tre grandan laboron.

De la jaro 1934 aperadis en esperantlingvaj gazetoj kaj kolektoj la sentopura originalpoezio de Hilda Dresen.

Sur la Kanariaj insuloj oni aperigis en 1968 ŝian elektitan poemkolekton "Norda naturo", kiun oni tre alte taksas.

En soveta Estonio H. Dresen daŭrigis eĉ pli intense la interpretadon de la estona klasika kiel ankaŭ de la samtempa poezio. Ŝi tradukis entute kreaĵojn de ĉirkaŭ 60 estonaj verkistoj. Pluraj tradukaĵoj kaj niajn aŭtorojn konatigantaj artikoloj

aperis en periodaĵoj de landoj kiel Hungario, Bulgario, Nederlando, Svedio kaj aliaj. La soltradukaĵoj de H. Dresen, speciale tiuj publikigitaj kiel libroj, "Kalevipoeg" (en mallongigita formo 1975), "Elektitaj poemoj de soveta Estonio" (1977) kaj "Elektita poemaro de Juhan Liiv" (1980) vekis viglan intereson en ĉiuj kontinentoj.

La recenzistoj de pluraj landoj akcentis la poemecon de ŝiaj tradukoj, altan artan majstrecon kaj ankaŭ la atentindan nivelon de pluraj verkistoj. Ripete oni esprimis la deziron, ke oni traduku la estonan literaturon pli ol oni faris ĝis nun.

Dum la lastaj vivojaroj H. Dresen okupiĝis plejparte per preparo de pli granda poemaro de sia plej favorata poetino Marie Under."

PERSONE

Kiam Lundgren miras, lasu lin paroli

— Mi miras, komencis Lundgren apenaŭ li sidiĝis ĉe la tablo. Kaj ni tri-kvar aliaj, kiuj ankaŭ venis pli frue al la klublokal, por iom babiloti kaj klaĉeti, sciis, ke ni silentu kaj lasu lin paroli pri sia miro.

— Mi miras, ĉu vere estas tiel bone pri tiu nova Esperantostrato.

La eldiro estis iom stranga, eĉ por veni de li, pro tio pluraj el ni interrompis lin.

— Kion vi celas? Kial tio ne estu pozitiva?

— Vi ja legis, ke tiu nova strato estos en nova loĝkvartalo. Vi scias, ke mi loĝas ankaŭ en tia moderna domaro, sur Karbostrato. Kaj la aliaj stratoj kaj placoj tie havas similajn nomojn: Ercoplaco, Granitvojo, kaj simile. Mia plej juna filino, kiu loĝas en la orienta antaŭurbo, loĝas sur iu

fungovojo. Mi eĉ ne scias, kiel ĝi nomiĝas en esperanto. Kaj ĉiuj aliaj vojoj tie ĉirkaŭe havas fungonomojn.

— Mi komprenas, kion vi celas. Ĉu vi timas, ke la aliaj vojoj ĉirkaŭ Esperantostrato ... mi interrompis lin.

— Jes, li daŭrigis. Ĉu ne estas nature atendi, ke en tiu loĝkvartalo troviĝos iu ldoplaco, iu Volapüktransirejo, iu Solresolponto, eble Interlingvustrato.

— Aŭ Latinosineflexioneringvojo, mi aldonis. Mi kredas, ke vi senkaŭze timas ion tian.

— Ĉu vere senkaŭze? demandis Lundgren. Se ĉiuj aliaj loĝkvartaloj havas samtemajn nomojn, ankaŭ tiu de la Esperantostrato havos. Vi povas certi pri tio.

— Sed kial la nomoj temu pri interlingvoj? Ili povos same bone ĉiuj rilati al esperanto. Tio estus multe pli logika. Oni povus havi Nylénplacon, Malmgrenstraton, eble straton nomita laŭ iu loka esperantogravulo.

— Ja povus esti, cedis Lundgren, sed mi miras ...

Nur definitiva decido pri ĉiuj aliaj nomoj liberigos lin de liaj duboj.

Ĉaŭ, diras via

Eta Mi

Danko al la vivo

Am E7 Am
 Dankon al la vi - vo, la ri - ĉaĵ - do - nan - to,
 G G7 C
 pro la du o - ku - loj, ki - es vid - ka - pa - blo
 C7 F
 hel - pas min dis - tin - gi ni - gron de la blan - ko
 E7 Am
 kaj la ste - lojn bri - lajn en la ĉi - el - al - to
 E7 Am
 kaj la a - ma - ton mi - an en la hom - a - ma - so.

*Dankon al la vivo, la riĉaĵdonanto,
 pro la du okuloj, kies vidkapablo
 helpas min distingi nigron de la blanko
 kaj la stelojn brilajn en la ĉielalto
 kaj la amaton mian en la homamaso.*

*Dankon al la vivo, la riĉaĵdonanto,
 pro la du oreloj, kies aŭdovasto
 kaptas tagon, nokton, grilojn kaj birdkantojn,
 batojn kaj turbinojn, bojojn kaj pluvfalojn
 kaj la voĉon mildan de la koramato.*

*Dankon al la vivo, la riĉaĵdonanto,
 pro la voĉdonaco kaj la literaro,
 kiuj donis vortojn al la pensimago,
 panjo, amiko, frato kaj la luma pado,
 kiun laŭiras lante la amata paŝo.*

*Dankon al la vivo, la riĉaĵdonanto,
 pro la longaj vojoj kaj la piedlaco.
 Ili min kondukis al urboj kaj vilaĝoj,
 bordoj kaj dezertoj, valoj kaj montaroj
 kaj al via domo, korto kaj loĝstrato.*

*Dankon al vi vivo, la riĉaĵdonanto,
 pro la kor' sentema al la homaj agoj.
 Tremas ĝi vidante homajn cerbumaĵojn,
 tremas ĝi vidante la malbonovaston,
 tremas ĝi vidante vian okulklaron.*

*Dankon al la vivo, la riĉaĵdonanto,
 pro la rid' kaj ploro, kiuj pro la kvanto
 distingigas ĝojon de malĝojoplanto,
 tiujn du substancojn de ĉiu mia kanto
 kaj de via kanto, tutegala kanto,
 kaj de ĉies kanto, tiu sama kanto.*

"Gracias a la vida" de Violeta Parra
 El la hispana tradukis Franko Luin